

# Sur Posteno

Oficiala organo de IPE - Internacia eldono

Due jaro  
H 26

Aperas dufoje en ĉiu monato

Oktobro (B)  
1934



## La fundamenta tasko

„Ĉiu IPE-ano konsideras kiel sian specifan taskon en proleta klasbatalo, kiel unuavican, fundamentan taskon la organizadon de peresperanta korespondado inter diverslandaj laboristaj kaj laborulaj kolektivoj, precipe ĉe la fabrikoj kaj grandaj laborejoj, kaj ĝenerale peresperantan proletan servon en revolucia batalo. PEK estas baza ŝtono de IPE.”

„IPE-sekcio, IPE-grupo aŭ aparta IPE-ano, kiuj ne komprenis tion ankoraŭ ne estas veraj membroj de IPE. . . .”

(El la rezolucio pri PEK-laboro, akceptita de la IPE-konferenco en Lille)

Jam ĉe la fondkongreso de IPE en Berlino, PEK-laboro estis difinita en la statuto kiel baza tasko de IPE. Sed la lastaj du jaroj montris plej variajn kaj strangajn konceptojn pri PEK

kaj eĉ reziston kontraŭ ĝi. Kaj estis efektive konstata, ke en la konferenco en Lille troviĝis kamaradoj, kiuj kontraŭstaris la insiston pri la gravo de PEK-laboro kaj volis ĝin prokrasti kiel duagran aferon. Unu bedaŭrinda afero estas klara, t.e. ke nur malmultaj komprenis la fundamentecon de la diferenco inter la linio de IPE kaj la linio de SAT. Akiro de tiu klara kompreno tra tuta IPE estas vere urĝa afero. Sen tiu klara kompreno — IPE ne multe valoros en la klasbatalo.

Multaj opinias, ke nia baza tasko estas propagandi Esperanton por krei amasan laboristan esperanto-movadon kaj ke ni devas postuli ke ĉiu laboristo lernu Esperanton.

Certe granda movado povas esti pli efika ol negranda (sed ne nepre estas!). Tamen, momenta kalkulo pruvos, ke eĉ en la plej favoraj kondiĉoj sub la kapitalismo, estus centoj da jaroj ĝis kiam la nuna esperantistaro

## Kiu sekvos?

En n-o 25 de SP ni anoncis, ke „unu el la venontaj n-oj komplete estas dediĉata al la IPE-movado en Britio.” Jen, ĝis estas.

La maniero aperi n-ojn de SP kiuj speciale pritraktas cirkonstancojn kiel laboristajn metodojn de iu landa IPE-organizo (sekcio aŭ UK) estas instigita de la nova, moskva redakcio kiel do ties merito. Ke la maniero estas taŭga, ni povas konstati per la materialo, kiun enhavas tiu ĉi n-o.

Por informi pri la stato de iu landa IPE-movado ni dependis de pli malpli kontinuuaj raportoj en la koncernaj landaj IPE-organoj. Konsekvence la konkludoj pri tiu aŭ alia IPE-organizo facile povis esti malkompletaj kiel eraraj. Ĝenerala utiligo de reciprokaj spertoj estas malhelpata. Pro tiuj konsideroj ni rapas diri, ke nia hodiaŭa SP enhavas ne simplajn legajon; ĝi enhavas materialon, kiun ni kun plena atento devas studi.

Ni konstatas, ke niaj britiaj k-doj en sia artikolaro ofte detalige tuŝas la PEK-laboron. Ili ja bazas ĉiujn

siajn entreprenojn sur la PEK-laboron. Jen, la instrua valoro por la IPE-anoj! Tiun instruon valoron ni portu en la IPE-grupojn kiel en tiujn vicojn de la laborista esp-istaro, kiujn ni volas kunmarŝigi por IPE.

Interpende kun tio ni inde taksu la gravon de la PEK-rezolucio, kiu ankaŭ estas publikigita en tiu ĉi n-o. Ĝi prezentas ĉiam konsulteblan direktivaron por ĉiu organiza IPE-unuo. Ĉiu IPE-sekcio aŭ UK havas la taskon zorgi, ke la PEK-rezolucio transformiĝu en vivan realon. Tiucele necesas detala klarigo eĉ nacilingva kiel konforma aktivo en ĉiu IPE-grupo.

Per la PEK-rezolucio kiu liveras direktivaron kiel ni devas labori kiel per la materialo de la britia sekcio, kiu montras, ke tiel oni povas labori estiĝas ia kompleta tuto. Per tio niaj laboroj kiel ne laste nia gazeto atingas pli altan nivelon. Tio igas nin insisti, ke ankaŭ aliaj sekcioj kiel UK-oj kompilu materialon pri siaj movadoj por SP-eldonoj, kiuj krome bone estas uzablaj por distribuado inter ĉiutendencaj esp-istoj koncerndaj. Kiu sekvos? La IPE-anoj kiel la SP-redakcio atendas. . . . .

Redakcio SP.

povus kreski al granda elcento de la laboristaro! Tion ofte komprenas prudentaj neesperantistoj pli facile ol iuj el niaj entuziasmaj membroj mem. Kaj eĉ honestaj laboristoj kiuj simpatias al Esperanto, ofte ne povas lerni ĝin pro plenokupiteco ĉe aliaj gravaj aferoj en la laborista movado. Tial, paroli tantazie pri Esperanto kaj postuli ke ĝin lernu ĉiuj kaj ataki tiujn kiuj ne povas, estas malprave kaj efektive nur fortigas kontraŭstaron al nia afero.

Ni devas konstati, ke ne ĉiuj povas lerni Esperanton sub la kapitalismo. Sed tio tute ne signifas, ke ĝi estas negrava afero.

Same kiel armeo estas kvazaŭ organismo konsistanta el diversaj fakoj: infanterio, artilerio, komunikaĵoj ks., kiuj kunlaboras kaj kies ekzistaro konsistas en tio, ke ĉiu havas sian apartan rolon en la fronto — ankaŭ la laborista movado havas siajn fakojn: partiojn, sindikatojn, kulturajn organizojn ks., kiuj po ĉiu havas sian difinitan taskon en la komuna fronto.

La laborista esperanto-movado ne povas esti pli ol ero en la laborista fronto; tamen ĝia rolo tute ne estas malgrava pro tio. Ĝia rolo estas efektive tre grava, kiel ni konstatos kiam ni pripensos. Kio estas tiu rolo?

Jam delonge la laboristoj sentis la neceson por la internacia solidareco. Sekve, preskaŭ ĉiu landa laborista organizo estas membro de iaspeca internacio. Sed tio signifas, ke la landaj organizoj estas internacie kunligitaj nur ĉe supra. Ja povas ekzisti internaciaj kunagoj certagradaj. Sed internaciaj rilatoj povas ekzisti preskaŭ nur por la ĉefoj, kiuj povas eĉ kunveni internacie malgraŭ la lingva diverseco, kaj kun malfacilo, povas persone esti praktikaj internaciistoj per la naciaj lingvoj.

Sed por la viculoj en la organizoj, internaciaj interrilatoj ne estas eblaj, ĉar ne ekzistas rimedoj. Ili povas esti internaciistoj, sed ne en persona,

## Klarigo al la supra foto

Suda distrikta tendaro, Julio 1934. Sub la litero L de la vorto „PROLETOJ” sur la afiŝo: k-dino R. S. Sturmer. Dekstre, apud la afiŝo: k-dino E. Cohen, suda DK-sekr. En la unua vico maldekstre: k-dino G. W. Keable, landa organizanto. Samvice de maldekstre la tria: k-dino Keable, redaktoro de „Ruĝa Esperantisto”.



intima senco. Ĉar per la naciaj lingvoj, rekta intimaj kontaktoj *sur amasa skalo* ne eblas. Tamen ne necesas emfazi, ke tiuj intimaj internaciaj rilatoj de la amasoj mem estus ege valoraj en la klasbatalo.

Per Esperanto ili estas eblaj. Ne per tio, ke ĉiu lernu Esperanton, kio ne estas ebla en la nuntempo, sed per tio, ke ĉiu *uzu ĝin*, t.e. uzu la aparaton de la laborista Esperanto-movado kiu brile taŭgas por la celo.

Jen la grandega signifo de nia PEK-laboro rilate al la gravo de Esperanto. Ĉar momenta pripensado montros, ke proleta esperantistaro taŭge funkcianta kiel la amasa interliga fako de la laboristaro, utilos al la vastaj amasoj kaj havos grandan influon al la klasbatalo, dum esperantista movado „nur-kultura” (kiel SAT) havas utilon nur al siaj propraj, relative malmultaj membroj.

Sekve oni devas konkludi, ke la precipa rolo de la lingvo Esperanto *en la nuntempo* ne estas alia ol la laboro de la organizita laborista Esperanto-movado por le klasbatalo.

Nia valoro ne konsistas en tio — kiom da esperantistoj ekzistas, sed en tio — kion kaj kiom ni faras por la ĉiutaga klasbatalo.

Cetere niaj funkciado, propagando, instruado kaj edukado de niaj membroj, kaj nia organiza sistemo, devas baziĝi sur klara koncepto pri tiu nia rolo, kaj devas esti tute alia ol en la „nur-kulturaj” Esperanto-organizoj. Ĉiu IPE-sekcio, ĉiu IPE-ano, ĉiu kunveno de IPE-anoj, devas memori ke „PEK estas baza ŝtono de IPE”.

La fakto ke nun, du jarojn post la fondo de IPE, ankoraŭ nur malmultaj sekcioj de IPE registris konsiderindajn sukcesojn sur PEK-kampo, kaj ke kelkaj rilatas al ĝi pasive eĉ evitas ĝin — pravas, ke ĝenerale oni ankoraŭ ne komprenis la plenan signifon de nia starpunkto pri la rolo de Esperanto en la nuntempo. Oni ne komprenas, ke tiu starpunkto diktas bazajn ŝanĝojn al la penskutimoj k funkciado de la laborista Esperanto-movado, kompare kun la periodo antaŭ la fondo de IPE. Por la plimulto el IPE-anoj, PEK estas ankoraŭ nur nova fako, ne la *bazo* de IPE.

Por sukcesi je tiu nia rolo, ni devas el nia sperto lerni du aferojn 1. al kiaspeca praktika laboro en la klasbatalo direkti niajn fortojn por plej eble multe utiligi, kaj 2. kiaj ni devas esti, kiel ni devas organizi nin, por plene utiligi niajn fortojn.

Al tiuj du demandoj, la diskuto en Lille donis klarajn respondojn, kiujn plene prezentas la PEK-rezolucio. Tial tiun rezolucion devas nepre studi, diskuti kaj plenumi ĉiu sekcio kaj grupo de IPE.

Pri la unua demando. Antaŭe, per PEK-laboro oni komprenis precipe la

## Pri la Ŝefilda filio de BLEA

La Ŝefilda filio de BLEA estas la plej malnova filio de la nuna BLEA. Seninterrompe dum la pasintaj dekdu jaroj ekzistas filio de BLEA en Ŝefild. La filio fondiĝis el kurso sub la aŭspicioj de kooperativa gildo. Kelkaj lernintoj aŭdis pri la Brita Ligo de Esp-istaj socialistoj (la tiama titolo de BLEA) k post iom da progreso k malgraŭ la malbeno de la konservativa instruanto, ili decidis fondi grupon k aliĝi al BLES. El tiuj fondintoj la nuna sekretario estas la sola restanto k mi

gazet-servadon, due la starigon k organizadon de kolektivaj korespondoj inter fabrikoj kaj aliaj laboristaj kolektivoj. La sperto pruvis la neceson ĝenerale inversigi tiun ordon. La plej grava laboro, almenaŭ por tiuj IPE-sekcioj kiuj laboras en leĝaj kondiĉoj (kiuj estas la plimulto) estas la kolektivaj korespondoj, kaj la rezolucio konstante emfazas, ke „Plej gravaj estas la internaciaj ligoj inter la fabrikoj kaj grandaj laborejoj (La fabrikoj estu niaj fortikaĵoj „Lenin”)”.

Kolektivaj korespondoj inter la vastaj neesperantistaj amasoj estas la plej grava laboro kiun ni povas fari, tial ke malgraŭ ĝia memevidenta gravo kiel klasbatala edukilo, la laborista movado aŭ ignoris ĝin ĉar ne ekzistas rimedoj, aŭ provis per la naciaj lingvoj kun malmulta sukceso. La internaciaj interligoj inter la vastaj amasoj estas efektivegblaj nur per la laborista Esperanto-movado. La plej gravaj korespondoj estas tiuj inter la fabrikoj kaj grandaj laborejoj (precipe inter Sovetio kaj kapitalismaj landoj) tial, ke la fabrikoj kaj grandaj laborejoj estas la kolonoj de la klasbatalo, kaj ilia revoluciemigo estas absolute necesa per la sukceso de la revolucio. Tial, malgraŭ ĉia malfacilo, ni devas direkti niajn fortojn al la fabrikoj kaj grandaj laborejoj unuavice, kaj rezisti la eraran tendencon kontentigi je la interligo de kulturaj kaj aliaj revoluciaj organizoj, kio estas pli facile farebla.

Cetere estas tre grave konstati, ke neniu IPE-sekcio aŭ grupo bezonas atendi ĝis ĝi fariĝos granda kaj riĉa antaŭ ol komenci, ĉar ĝin povas fari eĉ unuopaj kamaradoj.

La gazet-servado ĝenerale ne estas la *unua* PEK-tasko, tial, ke jam ekzistas bone funkciantaj revoluciaj gazet-servoj. Tamen gazet-servado povas esti tre utila, kondiĉe ke ni ne penu fari la laboron de aliaj kiuj estas pli bone ekipitaj ol ni. Nia gazet-servado devas ĉiam peni prezenti intimaĵojn el la laborista vivo kaj batalo, pli prefere ol la grandajn okazojn kiujn aliaj gazet-servoj raportas pli bone kaj pli rapide. Malkompreno pri tiu grava afero kaŭzis kaj ankoraŭ kaŭzas al

taksas, ke de post tiuj tagoj almenaŭ 350 gelaboristoj komencis lerni la lingvon en niaj vintro-kursoj. Kial la plejmulto el ili ne finlernis estas diskutinda temo. Sed oni povas meti la saman demandon antaŭ ĉiuj laboristaj organizoj k la respondo estas iomete psikologia, filozofia k ankaŭ tuŝas la ekonomian flankon. Tamen, unu fakto elstaras: se ni ne estus suferintaj pro financaj embarasoj ni povus allogi pli da adeptoj. Ankaŭ tiu problemo tuŝas ĉiujn flankojn de la homa vivo, eĉ la

PEK-laborantoj multe da malsukcesoj, malŝparitaj laboroj kaj elspezoj, kaj sekve seniluziigon k rezignon. Necesas celi pli al la ĝusta kvalito en niaj gazet-servoj — ĉu internaciaj, ĉu enlandaj — ol prefere nur al kvanto. Ne necesas denove raporti en niaj bultenoj la grandajn okazojn, kiuj jam estis vaste raportataj — se ni ne povas prezenti iun novan intiman aspekton de ili. Bona ekzemplo de tiu eraro estas la franca PEK-bulteno. Tion bone konstata ankaŭ niaj germanaj kamaradoj kaj aliaj en faŝismaj landoj, ĉar ili devas ne malŝpari sian riskan laboron, kaj konkretaj, intimaj, ilustraj informoj pri la klasbatalo en faŝismaj landoj estas nuntempe tre tre bezonataj en la aliaj landoj.

Cetere necesas memori, ke la materialo plej avide akceptitaj de revoluciaj gazetoj estas tradukoj de la kolektivaj korespondoj, kiuj ofte prezentas tiujn intimajn travivaĵojn, pri kiuj oni ne povas alimaniere ricevi informon.

Konklude, la plej grava tasko de IPE-grupoj kaj membroj ĝenerale estas la starigo de la menciitaj kolektivaj korespondoj; la dua tasko estas internaciaj kaj enlandaj gazet-servoj kun taŭga enhavo. La unua paŝo de ĉiu IPE-sekcio estas starigi plej eble fortan PEK-centron, kies *unua* devo estas kampanjo tra ĝia sekcio por komprenigi al ĉiu grupo kaj membro la veran signifon de PEK kaj ilin entiri en organizitan PEK-laboron.

Ne eblas en tiu ĉi artikolo tuŝi la konkretajn lecionojn de la diskuto en Lille — la riĉajn spertojn interŝanĝitajn, erarojn evitendajn k sukcesojn imitindajn. Pri tio temos estontaj artikoloj en „Sur Posteno”. Sed tion plene enhavas la PEK-rezolucio, do profunda studo kaj diskuto pri ĝi estas la tuja devo de ĉiu IPE-sekcio kaj IPE-ano kiu serioze deziras apliki la linion de IPE.

Tiu rezolucio indikas la ĝustan vojon por ĉiu IPE-ano. Nur marŝante tiun vojon ni evitos la riproĉon, ke ankoraŭ nur malgranda parto el niaj fortoj estas utiligitaj en la praktika ĉiutaga servado en la klasbatalo, kio estas la vera rolo de nia movado.

W. G. Keable.



## BLEA ankaŭ organizas sin

En la jaroj antaŭ la alpreno de revolucia politiko, la bazo de B.L.E.A. estis la individuaj membroj. Krome ekzistis kelkaj „grupoj” de diversaj grandecoj kiuj funkciis laŭ propraj metodoj kaj deziroj. Tiuj grupoj kaj individuoj estis malfirme kunligitaj per Ekzekutiva Komitato kiu sidis en Londono, kvankam tie apenaŭ ekzistis B.L.E.A.-grupoj, kaj la Jara Ĝenerala Kunveno, kiu laboris laŭ la S.A.T.-metodo de samaj rajtoj por ĉiuj individuoj kiuj povas aliri la Kunvenon, kaj referendumo voĉdono. La celo de B.L.E.A. estis propagandi Esperanton inter la laboristoj. Tiun laboron la membroj plenumis laŭ plej diversaj metodoj, kaj la plejparto el la membroj nur pagis ĉiujaran kotizon.

Dum la unua jaro post alpreno de nova politiko, frue montriĝis la mankoj de ĉi hazarda organizmetodo, kaj ĉe proksima Jarkunveno (1933) la tuta bazo de la organizo estis ŝanĝita. Tute nova statuto estis akceptita kiu bazis B.L.E.A.-on sur la filioj. Estis forigitaj la antaŭaj „grupoj” kaj „kluboj”. Ilin anstatauis ĉie „filioj” de B.L.E.A. kiuj rajtas elekti voĉdonrajtajn delegitojn al dujara Nacia Konferenco. Ankoraŭ restas kelkaj individuaj membroj, sed estas klare dirite en la novaj statutoj, ke la devo de ĉiu individuo estas konstrui filion.

Ĉe la sama konferenco oni decidis, ke plej urĝa tasko estas la malcentrigo de BLEA per la konstruado de Distrikto-Komitatoj laŭ la modelo de nia frata organizo GLEA.

Ni decidis pri starigo de tri distriktoj; unua por Skotlando kaj Nord-Irlando; dua por Meza kaj Norda Anglio kaj tria por Londono kaj Sud-Anglio. La tasko organizi la komitaton estis donita al plej forta filio en la distrikto.

La unua tasko de la novaj distrikta komitatoj estis projekti kaj funkciigi Unuiaran Planon tutlandan. Tiu plano prilaboris ĉiujn flankojn de BLEA-laboro: — kursoj, PEK-laboro, vendo de „Contact”, presserva laboro, kolekto de mono por speciala multobligila kaso, pretigo de novaj instruistoj, altigo de lingva nivelo, vendo de „Sur Posteno” kaj pligrandigo de membronombro. Partoprenis la planon ĉiuj filioj kaj multaj individuaj membroj.

Ĉe la ekkonstruado de la plano frontis nin nova problemo. Kiel kontroli la progreson de la filioj kaj gvidi ilian agadon al plenumo de la plano? Jam stariĝis en BLEA krom la DK-oj, landa PEK-Centro, Lingva Komitato, Ekrelo-Agentejo, „Sur Posteno” Agentejo, kaj krome ekzistis Nacia Sekretario kaj Kasisto. Ĉiuj tiuj fakoj kaj oficistoj bezonas havi firman kontakton kun la filioj. Ekzemple, la

Lingva Komitato preparis la BLEA-Lecionaron kaj necesas ke ĝi ricevu raportojn de la filioj pri la utiligo de tiu lecionaro, pri ĝiaj malfaciloj kaj mankoj; necesas krome, ke ĝi povu helpi solvi la lingvo-problemojn kiujn renkontas la PEK-laborantoj, donu tradukojn de neologismoj, helpu trovi ĝustajn teknikajn vortojn ktp. Same la PEK-Centro devas kontroli la sendon kaj ricevon de PEK-korespondaĵoj, instigi novajn filiojn al PEK-laboro, kaj ĝenerale direktivi la PEK-laboron de ĉiuj filioj. La kasisto devas ricevi la diversajn pagojn, kaj krome la Distrikta Komitatoj devas kontroli ĉiujn laborojn de la koncernaj filioj. Jen la malfacilo. Plejparto el niaj filioj estas tie malgrandaj — 5, 7, aŭ 10 membraj. Pro financomanko, ne eblas, ke ili konstante korespondu kun ĉiuj tiuj fakoj. Ankaŭ tio estus tro granda malŝparo de tempo kaj energio. Estas nepre necese ke ili korespondu pri organizaj aferoj nur kun unu loko, la distrikta komitatoj.

Do, ni aranĝis sistemon de monataj raportfolioj. La Naciaj Fakoj (PEK, Lingva kaj Kasista) preparas koncernajn raportfoliojn kaj sendas ilin faske al la D.K.-oj kune kun individuaj informoj kaj instrukcioj por la opaj filioj. Tiujn la D.K.-oj alsendas al ĉiu filio en la propra distrikto kune kun iu cirkulero pri distrikta aferoj.

Nuntempe estas tri raportfolioj. La unua pritraktas la PEK-laboron. Tie oni informas pri progreso de jam starigitaj kolektivaj korespondoj, pri bezonataj adresoj enlandaj kaj eksterlandaj, pri aliaj PEK-servoj — utiligo de presmaterialo ktp, pri vendo de „Contact”, pago por „Contact” al agentejo, kaj oni tie kunmetas monatan garantipagon kelkpecan kiu estas la financa bazo de la PEK-cen-



Tutlanda konferenco, Sefildo, Junio 1933. En la mezo de la plej supra vico: k-do Smith, sekretario de BLEA. Antaŭ li maldekstre: k-do B. Turner, PEK-estro.

mantrajn aferojn.

Kiam oni trarigardas la jarojn, oni memoras multajn gek-dojn, kiuj iam helpis la disvolvon de nia movado en nia urbo. Ni nun konstatas la malhelpon flanke de la organizformo de SAT k tuta mankon de forta, centra gvidado. La distingo „per k por” dum la SAT-periodo malhelpis progreson. Kiom da mistifiko ekzistis en la kapoj de la lernintoj? Kiom da adeptoj ni perdis pro la konfuzo, pro la altaj, duoblaj kotizoj! Tamen, ni nun konstatas niajn organizajn erarojn. La oficistoj k la CK de BLES niam gvidis dum tiu ĉi periodo k la membroj ĉiam penis helpi sin per diversaj komitatoj ktp, sed efektive ni tiam vagis en sovaĝejo. Pro la fakto, ke la ĉiujara konferenco ĉiam okazis en Londono la nordaj membroj starigis nordan komitaton, kiu kunvenis ĉiun kvaronan jaron en trafikaj urboj k pridiskutis la organizformojn k antaŭe senditajn rezoluciojn. Poste la norda komitato formortis, sed la problemo pri organizado k gvidado restis. En tiu ĉi periodo ekzistis forta, kontraŭlondona sento pro la malproksimeco inter la Nordo k Londono k pro la izoligo de la Nordo, kie la movado estis forta. La Londonanoj kontrolis la organizon per izoligo de la Nordo. Fine la Nordanoj venkis per la ŝanĝo de la statutoj, kiu postulis, ke la CK devas peti invitojn de la grupoj por okazigi la jarkunvenon en iliaj urboj.

Poste disvolviĝis landpartaj federacioj, sed vere tiuj ĉi federacioj neniam multe pritraktis la problemojn de internacia klasbatalo. La filioj k grupoj suferis pro manko de gvidado, sed ni sam celis malhelpi la oportunistojn k la malnovaj statutoj k konstitucio de BLFA enhavis multajn mankojn. La membroj ĉiam tenis la rajton, ŝanĝi la konstitucion k ili bone uzis tiun ĉi rajton, kiam ili aliĝis al IPE. Ĉio okazis tute laŭ la konstitucio kiu okazis pri la vigleco de la malnovaj membroj k nur la oportunistoj kontraŭis k rompis la statutojn. Tia estas la demokrateco de oportunistoj: ili neniam akceptas decidojn kontraŭ siaj celoj.

BLEA estas la oficiala Laborista Esperanto Asocio en Britio. Per vigla PEK-laboro ni konstruas fortan movadon kiu influos milojn da gelaboristoj. Ni jam nun atentis pri tiu laboro. Ni starigas novajn filiojn en urboj, kiujn antaŭe ni ne tuŝis. Per distrikta komitatoj, kiuj gvidas k peras la evidlinion de la diversaj fakoj al la lokaj filioj ni nun funkcias kiel vera, proleta batalorganizo. Post ni restis la eraroj de la pasinteco. Antaŭ ni estas la proleta venko. Ni staras sur ĝusta vojo al la venko. Streĉa k ŝturma laboro finfine venkos.

H. J. Clayton,  
Sek. de la grupo Sefild (Sheffield)



tro ĝis nun. En la dua raportfolio oni raportas pri instrua laboro — kiom da novaj kursoj oni starigis dum la monato, kiom da novaj lernantoj oni varbis, kiom ĉeestas la kursojn ĉiusemajne; instruisto raportas pri utiligo de lecionaro kaj pri kritikoj de la lernantoj pri instrumentado. Krome estas loko por raporto pri neologismoj renkontitaj dum PEK-laboro aŭ legado. La tria folio pritraktas kasaferojn. Ĝi surhavas konton pri pagoj farataj al „Ruĝa Esperantisto”, kotizoj, pago por lecionaroj, propagandaj folioj ktp, kaj por „Sur Posteno”.

Ĉiunonate la filioj plenigas tiujn raportfoliojn kun karbonpaperaj kopioj, kaj resendas ilin al la distriktaj komitatoj.

La D.K., ricevinte la foliojn entekigas unu kopion de ĉiu, kaj sendas la alian al la koncerna fako, — priinstruaj al L.K., pri PEKaj al PEK-centro, pri-kasaj al Kasisto ktp.

Do, jam per malmulta elspezo de energio kaj mono ni havas niajn plenajn kronikojn, bonan kaj intiman kon-

takton inter filioj kaj D.K.oj kaj inter filioj kaj naciaj fakoj.

Tiu sistemo jam daŭre funkciis dum unu jaro. Finiĝis nia unua jarplano kaj nun komenciĝas dua. La rezultoj montras gravan progreson. Nun nia Asocio estas firme konstruita unuo kiu rapide reagis al la centra gvido, kiu organizite laboras laŭplane kaj metode. Kvankam ni ne sukcesis multe kreskigi nian membraron dum la jaro, ni ege plibonigis ĝian organizitecon. Anstataŭ 13 filioj ni nun havas 20 kaj rapide konstruas novajn. Nia efiko ĉe la ĝenerala laborista movado estas nekalkuleble pli granda ol antaŭe. Nun ni efikas al la amasagadoj per nia nacie organizita PEK-laboro (ekzemple, Malsat-Marŝo, 1934) per nia ĉiutaga perado de leteroj al laboristaj kolektivoj, per nia presserva laboro.

Nunjare ni komencas ripari la breĉon en nia membronombro. Nia tuta organizo sin turnas al la starigo de kursoj kaj varbo de novaj membroj. Per planado kaj organizado ni venkos.

Gladys Keable. Nacia Organizado.

## RUĜA ESPERANTISTO

„Ruĝa Esperantisto” unuafoje aperis en januaro 1932, kiel la organo de la Unuiga Komitato por Britio k la Opozicio en la Brita Laborista Esperanto-Asocio. Ja kruda ĝi estis, laŭ enhavo k aspekto, ĉar mankis sperta kunlaborantaro verka k teknika, tamen per ĝi la batalo por varbi BLEAn por IPE estis ŝturma k sukcesa, k la sesa numero, en julio samjare, aperis kiel la oficiala organo de BLEA.

De tiam la gazeto aperas regule monate k pliboniĝis enhance k aspekte. Ankoraŭ ne eblas ĝin presi, ĉar en Britio preskosto estas alta tiel, ke oni bezonus almenaŭ 2,500 abonantojn por ke presado estu finance ebla. Tial ĝi dum sufiĉe longa tempo devos resti nur hektografita. Tamen ĝi estas sufiĉe bonaspekta k ne tro malampleksa, ĉar per uzo de skribmaŝino kun malgrandaj litertipoj, ĝiaj sep paĝoj, entenas almenaŭ 5,000 vortojn plus desegnoj ks. Komence ni estis tre malheldataj de manko de propra multobligilo, sed ni nun posedas la propran, aĉetis per pronto, repaĝita en unu jaro per speciala monkollektado de la membroj. Ni produktas nian gazeton en kvanto de iom pli ol 500, kiu nombro inkluzivas abonantojn ekster niaj vicoj k ankaŭ kvanton sendatan al LEA de Nord-Ameriko. Dum kelka tempo ni regule provizis kvanton al Aŭstralio, sed la tiea IPE-sekcio nun povas eldoni la propran gazeton laŭ modelo de „Ruĝa Esperantisto”.

La enhavo de „Ruĝa Esperantisto” estas laŭplane direktata precipe por la aktualaj bezonoj de la organizo. Jen

estas la principa skemo, sed necesas memori ke la nesufiĉa grandeco de la gazeto ĉiam premas la enhavon, kiu tial ne ĉiam povas esti tia, kian oni volus, nek ĉiam same aranĝita.

La unua paĝo portas la gvidartikolon. Tiu kelkfoje temas pri la internaj taskoj de la organizo mem, kiaj ekz. la jenaj titoloj: „Niaj kursoj” (kiel k kiujn varbi, kiel trakti la lernantojn ktp), „Nia Plano” (kiel ni rilatu al la neŭtraluloj ktp), „Nacia, Internacia k Monda Lingvoj” (nia ideologia bazo), kongres-raportoj ks. Alifoje la gvidartikolo temas pri aktuala politika temo, ekz. „La batalo kontraŭ la faŝismo”, „La nova senlaborula leĝo”, „La datreveno de la rusa revolucio” ks. Sed traktante tiujn aktualajn politikajn temojn, la gvidartikoloj ĉiam indikas la tiurilatajn praktikajn taskojn de la proleta esperanto-movado ekz. pri „La nova senlaborula leĝo”, la neceson organizi salutleterojn el eksterlando por la kontingentoj de la tutlanda protesta malsatmarŝo, pri „La datreveno de la rusa revolucio”, nian rolon organizi amasan kunligon kun sovetiaj laboristoj k ankaŭ provizi al Sovetio teknikan informon, pro kio ni jam gajnis nian unuan ŝturmulan ateston, ks. Ni emfazis, ke niaj politikaj artikoloj neniam estas abstraktaj, apartigitaj de nia propra esperanto-movado, sed ĉiam konkrete eksplikas nian praktikan rolon en la koncerna fako de la klasbatalo.

La dua paĝo de „Ruĝa Esperantisto” portas „Raportojn”. En la unua tempo raportis la filioj mem, sed ni konstatis, ke ordinare raportis nur la

pli grandaj filioj, ĉar la malgrandaj filioj ŝajne opiniis siajn farojn neraportindaj. Tio ne estis taŭga, ĉar la negrandaj atingoj de malgrandaj filioj povas esti relative pli notindaj ol la faroj de la grandaj filioj, ĉar ili montrus la eblojn al aliaj filioj malgrandaj. Tial la raportadon nun faras la tri distriktaj komitatoj pri siaj respektivaj filioj; el la filiaj raportfolioj kiujn ili mem regule ricevas, ili verkas raportojn pri la tutaj distriktoj, ne nur informante pri nudaj faroj, sed komentante ilin per laŭdo pri imitindaj paŝoj, k kritikoj pri kritikindaĵoj.

La tria paĝo estas la PEK-paĝo, sub gvidado de nia landa PEK-centro. Tiu paĝo estas organiza; ĝi ne nur raportas pri la atingoj, sed klarigas la labormetodojn, prezentante konkretajn ekzemplojn de la sukcesoj de la filioj k instigante al la filioj mem raportoj en la PEK-paĝo pri siaj spertoj. Tia organiza PEK-paĝo estas tre necesa por ĉiu IPE-organo. Ĝian gravon por ni montras la fakto, ke kvankam BLEA estas unu el la plej malgranda sekcioj de IPE, ĝi estas jam unu el la plej bonaj sur la PEK-kampo.

La kvara paĝo de „Ruĝa Esperantisto” ordinare estas informa paĝo pri la esperanto-movado. Dum kelka tempo ĝi dividiĝis en du kolonoj: „En Ruĝa Esperantio” k „En Neŭtrallio”. Ni estis devigataj provizore ĉesigi la kolonon „En Neŭtrallio” pro malsano de la koncerna kamarado: cetere evidentiĝis, ke tiu severa divido de la paĝo ne estas ĉiam ebla. Tamen ni tute ne intencas ignori la okazojn en la neŭtrala tendaro, tial ke en Britio la neŭtrala movado estas ankoraŭ multe pli granda ol nia k necesas ke niaj membroj konu ĝin, ĉar en ĝi ni povas varbi.

La sesa k sepa paĝoj havas titolojn „Por Lingvo-Studantoj” k „Ni Lernu traduki”, k ambaŭ celas al la forigo de naciismoj k altigo de la ĝenerala lingvo-nivelo, kiujn emfazis la lingva rezolucio akceptita de la IPE-konferenco en Lille. Povas esti ke kelkaj opinias ke du paĝoj el nur sep estas tro por dediĉi al lingvaj temoj, sed sur bazo de niaj praktikaj PEK-spertoj, ni forte opinias, ke tia serioza pritrakto de la lingvo-afero estas necesa por ĉiu IPE-sekcio kiu vere deziras apliki la linion de IPE. Cetere niaj lingvaj artikoloj estas treege ŝatataj, ne nur de niaj membroj, sed ankaŭ ekster niaj vicoj, k tiel gajnas por ni prestiĝon.

La sepa paĝo enhavas anoncojn, eksterlandajn petojn, recenzojn, poemojn ktp, sed, kompreneble, tiuj aferoj ordinare bezonas pli ol unu paĝon, do okupas malsuprajn partojn de la aliaj paĝoj.



Ni dubas ĉu la enhavo de „Ruĝa Esperantisto” povas esti multe plibonigata, ĝis ni prosperos ĝin presi. Tamen ni bonvenigus konsilojn tiurilatajn. La ĉefa manko de ĝi, kiel organo de la asocio, estas tio, ke la nombro de ĝiaj kontribuantoj oni povas kalkuli per la fingroj. Tiu fakto precipe esprimas la jenecon de nia asocio, tamen ankaŭ la malamplekseco de la gazeto malhelpas tiurilate dum kelka tempo.

Malgraŭ ke ĝi ne estas presata, „Ruĝa Esperantisto” estas ŝatata, k ĝia efikeco estas pruvita ne nur de ĝia sukceso en la konstruado de BLEA, sed ankaŭ de ĝia rolo en la starigo de la Aŭstralia LEA. Ĝia sukceso pravas kiom dependas de forta organo, k ankaŭ kiom povas fari eĉ malgrandaj k malriĉaj sekcioj de IPE. La ĉefa afero estas, plani le enhavon de la organo laŭ bezonoj de la asocio kiun ĝi devas gvidi k organizi.

W. G. Keable.


### Kiel nia landa PEK - Centro laboras

La celo de ĉi tiu artikolo ne estas paroli pri niaj relative bonaj sukcesoj sur la PEK-kampo, sed prefere priskribi nian labormetodon por ke aliaj eble ion lernu el niaj spertoj. Tamen, por ke la leganto povu prezenti al si pli malpli klaran bildon ni diru, ke la nombro da funkciaj kolektivaj korespondoj estas 30, el kiuj pluraj koncernas lab-kolektivojn kun pli ol 500 anoj neesperantistaj. Nia esp-lingva PEK-bulteno atingas 17 landojn k 118 lokojn. Nia nacilingva bulteno „Contact” vendiĝas en kvanto de pli ol 1,000 ekzempleroj. La nombro da filioj kiuj aktive partoprenas PEK-laboron estas proksimume 30, el kiuj plej granda havas 34 anojn. La nombro da spertaj tradukkapablaj anoj ne estas granda. Se oni konsideras, ke antaŭ 18 monatoj nek estis „Britia PEK-Bulteno” nek „Contact” k la nombro da kolektivaj korespondoj estis kalkulebla per la fingroj de unu mano, oni ja konsentos rimarkindan progreson.

Tiuj pli malnovaj anoj kiuj memoras la buŝservadon de la SAT-gvidantoj al „praktika aplikado de Esperanto en la klasbatalo”, k kiuj batalis en SAT por realigi la devizon, entuziasme bonvenigis la starigon de IPE k ties plenan agnoskon de PEK. Unua faro de la IPE-gvidantoj estis ellabori planon pri la mondskala organizado de PEK-laboro k unuan lokon en la statutoj okupas la organizado de korespondado inter fabrikoj k lab-organizoj (ILKK), k la duan lokon gazet-servado. Kvankam la praktiko jam modifis la unuan teorian dividiĝon de la taskoj ili hodiaŭ res-


tas esence la samaj k la organizostrukturo de nia Landa PEK baziĝas sur la plano kiel unue ellaborita de la Internacia PEK-centro. Malgraŭ tio, ke la hodiaŭaj kondiĉoj pli ol iam antaŭe postulas plenan efektivigon de tiu plano, oni povas konstati grandan postreston k egale grandan konfuzon ĉe kelkaj sekcioj. Por certigi, ke ĉiu bone komprenu nian labormetodon, necesas unue klarigi, ke nia Landa PEK-centro celas plenumi duoblan rolon: (1) teni intiman kontakton kun ĉiuj eksterlandaj PEK-centroj, k (2) stimuli k organizi PEK-laboron ĉe ĉiu LEA-filio. Ĉi tie ni emfazu, ke ni ĉiam malaprobas ian tendencon rigardi PEK-laboron kiel ion apartan de la ordinara filia taskaro. Estas la kvanto k kvalito de PEK-laboro farata de la filio kiu kialas ties ekziston.

La jena simpla diagramo klarigos nian ideon pri la internacia strukturo de PEK.



- I. Internacia PEK-centro.
- L. Landa PEK-centro.
- Centra organa.
- .... Esp-lingvaj PEK-bultenoj.

Tre baldaŭ post fondiĝo de nia Landa PEK-centro la laboro jam kreskis ĝis tia grado, ke por certigi laŭeble glatan funkciadon de la aparato necesis decentralizi la administran laboron en la manojn de la 3 Distriktaj Komitatoj kiuj plej intime komprenas la kondiĉojn k pli ĝuste povas taksii la eblojn en siaj respektivaj regionoj. Tamen ni zorgas, ke tio ne kondukas al fermiteco ĉe la Landa PEK-centro, ĉar ĉiu ties ano mem aktive partoprenas en filia laboro.



- L. Landa PEK-Centro.
- D. Distrikta Komitato.
- F. Filio.

N. Ne-esperantistaj laboristoj (fabrikoj, k.t.p.).

Ni opinias, ke la supra diagramo estas memklariga k necesas aldoni nur tion, ke per sistemo de raportado oni informiĝas pri la progreso de la laboro en ĉiu loko. La filioj konkur- as inter si en la vendado de la nacilingva bulteno „Contact” inter neesperantistoj.

Ni nun transpaŝos al pli detalaj klarigoj pri la diversaj fakoj de nia P.E.K.-laboro. Ni rekonas jenan ĝeneralan dividiĝon de la laboro. (1.) Kolektiva korespondado; t.e. Interfabrika, interorganiza k ĝenerale inter-neesperantista; (2.). Presservado, eksterlanda k enlanda.

La kolektiva korespondado ĉiam okupas unuan lokon k por helpi la filioj k eĉ unuopaj k-doĵ planece ataki la problemon, ni obligis k liveris al ĉiu P.E.K.-ulo ekzemplerojn de anglalingva „P.E.K.-direktivaro”. La direktivaro resumas la spertojn de la plej sukcesa filio sur la P.E.K.-kampo, klarigas la uzitajn metodojn k sugest- as novajn labormetodojn. Estas jam pruvite, ke nia „P.E.K.-direktivaro” bone servis precipe niajn plinovajn filiojn al kiuj P.E.K. estis nur nomo. Krom tio, ni disponas paĝon ĉiumonate en la nacia organo „Ruĝa Esperantisto” sur kiu ni komentas la laborojn de la filioj, elmontras la tuj farendajn taskojn k diskutas aferojn kiuj intime rilatas al P.E.K.-laboro.

Pere de la Distriktaj Komitatoj ni sendas k ricevas de ĉiu filio raport- folion kiu petas informon pri la jenaj fakoj: (1.). Progreso de jam starigitaj korespondoj; (2.). Priskribo de korespondoj starigitaj dum la pasinta monato; (3). Kunligoj bezonataj (a.) en Britio (b) en eksterlando; (4). Utili- gado de ricevita materialo k aliaj P.E.K.-servoj; (5). Nombro da arti- koloj senditaj al Landa P.E.K.-cen- tro por „Britia P.E.K.-bulteno”; (6). Nombro da „Contact” oj venditaj; (7). Mono pagita por „Contact”; (8). Mono pagita por P.E.K.-kaso. Reven- inte al la Distrikta Komitato, la folioj estas kontrolataj de la koncerna k-do kiu faras siajn marginajn notojn k tiam ekspedas la faskon al la Landa P.E.K.-centro. Per tiu metodo ĉiu koncerna instanco povas fari al si tre klaran bildon pri la ĝenerala dis-volvado k ankaŭ povas tuj rimarki breĉojn. Surbaze de la raportoj la Landa P.E.K.-centro k la Distriktaj Komitatoj povas doni ĝustajn direkti-vojn. Ni ne faras la pretendon, ke ĉio iras glate k sate, sed ni ja povas aserti, ke la ĉiutaga praktiko jam nerifuteble pruvis la taŭgecon de nia metodo al la ĉi tieaj kondiĉoj.

Ne multe utilas priskribi ĉi tie la diversajn metodojn kiujn ni uzas cele



al starigo de kolektivaj korespondoj, ĉar la kondiĉoj tiom varias laŭ landoj k eĉ lokoj, ke tio kio montriĝas taŭga en unu lando povas esti senutila en alia. Ni tam endiru, ke en ĉi tiu laboro nia devizo ne estas „Internacia Lingvo” sed „Internacia Kunligo”. Ĉiu, eĉ duonkonscia laboristo, agnoskas la valoron de internacia kunligo sed estas iom dubema pri la praktikeblo. Unu fakto valoras pli ol mil predikoj. Kvankam la plej urĝa tasko de nia Lingva Komitato estas altigi la lingvonivelon, precipe en rilato al tradukado, tamen per bona organizado de la iam disponeblaj fortoj oni povas venki multajn malfacilojn. Nia plej sukcesa filio bone utiligas la servojn de komencantoj. La pli spertaj k-doĵ faras malnetajn tradukojn el esperanto en la anglalingvon kiujn la komencantoj tiam poluras k nete reskribas sur folioj kape presitaj en la angla lingvo: „Ricevita per Proleta Esperanto-Korespondado. Tradukis. Filio de Brita Laborista Esperanto Asocio. De. . . . Al. . . .”. Tre utilaj anoj estas ankaŭ tiuj simpatiantoj, kiuj pro plena okupiteco en propraj organizaj aferoj k oficoj ne havas tempon ellerni esperanton, sed kiuj tamen zorgas pri tio, ke niaj peritaĵoj ĉiam okupu lokon sur la tagordo ĉe organizkunvenoj ktp. Restas ankoraŭ multaj malfaciloj kiuj estas ekster nia kontrolo, ekzemple neglekto flanke de eksterlandaj korespondantoj, la lavango da pure individuaj korespondpetoj k.c., sed ili estos forigeblaj kiam ni havos fortan Internacian PEK-centron en intima k daŭra kontakto kun la Landaj PEK-centroj per sistemo de monata raportado k kiu havos ĉiam je sia dispono sufiĉan spacon en regule aperanta centra organo.

Nia presserva laboro konsistas el du fakoj: (1) eldono de monata esp-lingva P.E.K.-bulteno k (2) eldono de nacilingva P.E.K.-bulteno. Ĉe la produkto de la unuaj No-No. de „Britia-P.E.K.-bulteno” ni spertis grandegajn malfacilojn. Ni havis nek monon, nek sperton k nur la plej primitivan aparaton. Sed ni havis ion pli gravan, la volon k la firman konvinkon pri la neceso de tia organo k la ĉiam kreskanta amaso da prestranĉoj el multaj eksterlandaj gazetoj elokvente atestas la utilon de nia bulteno. Elektante la uzotan materialon, ni ĉiam tenas en la memoro la disvastiĝon de la anglalingva gazetaro k klopodas provizi informojn ne haveblajn per aliaj servoj. Ni ja konstatas multajn mankojn en nia bulteno k ĉiel penadas forigi ilin. Abundas pruvoj, ke ni iom post iom estras ĉi novan al ni teknikon. La financado de la bulteno estas problemo ankoraŭ ne kontentige solvita, tamen unu filio provizas pli ol duonon

de la bezonata sumo per vendado de la monata organo de F.S.U. (Amikoj de Sovetunio) „Hodiaŭa Rusio”. La profiton oni donacas al la P.E.K.-kaso k tiel faras duoblan klaservon. Tiu organo jam plurfoje enpresis leterojn el niaj eksterlandaj korespondantoj. Estas tre malfacile eldoni bultenon kiu plaĉos al ĉiu, sed ni ne povas ne altiri la atenton de multaj Landaj P.E.K.-centroj al senutilo de longaj ĝeneraltemaj artikoloj krom en tre esceptaj cirkonstancoj. La konciza, vivoplena rakonto kiu ŝetas novan lumon sur iun okazintaĵon estas tre valora k nepre trovos akcepton ĉie. Ekzemple, la nova rubriko en „Sur Posteno” „Ruĝa Rido” estas laŭ nia opinio tre utila k imitinda. Ni neniel sugestas ke oni plenigu paĝojn per tiaj rakontetoj, sed ili ja havas uzvaloron precipe ĉe neklaskonsciaj laboristoj kiel enkondukilojn al serioza propagando. Resume, ni diru, ke oni povas aprobi la ĝeneralan direktivon „Kion vi trovas interesa k utila en alia bulteno, tion imitu en la via”.

La enlanda presserva laboro estis dumlonge — k ankoraŭ estas — unu el niaj plej malfortaj flankoj. La revoluciaj ĵurnaloj ĉe ni estas tre malmultaj k ĉiam baraktas por konservi la vivon. Preskaŭ ĉiu portas pezan ŝarĝon de ŝuldoj k sekve estas devigata severe limigi la eldonkvanton k amplekson. Rezultas el ĉi tio, ke ili povas aperigi nur la plej aktualajn k urĝajn novaĵojn. Krom tio, ni rekonas kiel gravan devon la taskon penetri novajn laboristajn rondojn ne kutime tuŝatajn per partia propagando, tiel entirante novajn kontingentojn en la batalon k disvastigante inter ili la scion pri la sukcesoj de Socialisma Konstruado en Sovetio. La supraj konsideroj decidigis nin eldoni propran nacilingvan bultenon. Tiel farante, ni kredis ne konkurenci kun la jam ekzistantaj revoluciaj gazetoj unue (ĉar nia P.E.K.-materialo estas el alia speco kvankam samcela, ŝetante lumon sur nov-

ajn facetojn de la batalo k kiu antaŭ detiri intereson de la jamaj gazetoj, ja stimulus tian intereson; k due) ĉar kiel jam dirite, ni celas novajn rondojn.

Akirinte la necesan monsubtenon per kolektado inter la anaro, ni direktis nian ŝipeton, 16 paĝan obligitan gazeton en eldonkvanto de 750 ekz-oj. Ĉiumonate la eldonkvanto kreskis k post 6 monatoj ni atingis 1,500 ekz-ojn k por la unua fojo la enspezo superis la elspezon. Ni nun povas konkludi, ke ni estas sur ĝusta linio k restas nur pliperfektigi la organizadon de ĉi fako k krei bazon por presita gazeto kiu ebligas al ni utiligi bonan materialon kiun ni devas sub nunaj kondiĉoj flankenmeti. Ĉar la plensukceso de tiaj eldonaĵoj estas neapartigeble kunligita kun regula ricevo de taŭga materialo, ni urĝe petas niajn eksterlandajn k-doĵn ĉiel klopodi la aferon de regule aperantaj P.E.K.-bultenoj kun zorge elektitaj artikoloj. Ili ankaŭ certigu, ke la enhavo de kolektivaj k eĉ individuaj leteroj estu interesa k represinda.

Finante ĉi skizon ni diru, ke ĉe filioj kiuj aktive partoprenas P.E.K.-laboron jam ne necesas prediki al eĉ la plej nova komencanto pri la utilo de Esperanto en la klasbatalo, ĉar tiom da farendaj taskoj estas krom elstudi la lingvon, ke ĉiu sentas sin utila parto de viva unuo kun klare difinitaj taskoj; unuo kiu per sia celkonscia k efika laboro, estas rekonata de la frataj organizoj kiel valora kunlaboranto.

Al tiuj kiuj ankoraŭ restas ekster la P.E.K.-vicoj ni diras „Ni staras sur la sojlo de grandaj venkoj, sed ni urĝe bezonas vian helpon. La laboro estas multflanka k ĉiu laborema proleta esperantisto povas trovi niĉon en nia P.E.K.-aparato. Enviciĝu tuj!!”

Por: Pek-Centro-Britio,  
Edinburg Dundee St. 6o.  
Bert Turner.

## Historia skizeto pri la Edinburga filio

En Oktobio de la jaro 1926, areto da gelaboristoj — 10 viroj k 2 virinoj — sin prezentis por studi esperanton ĉe kurso starigita sub aŭspicioj de la Skota Laborkolegio. Notu ĉi tie, ke la granda plimulto da tiaj studentoj estas jam atingintaj certan gradon de klaskonscio k havas organizan kunligon kun iu sekcio de la laborista movado. La tipa studento de la Laborkolegio pasigas la vintrajn monatojn ĉeestante kursojn k pasigas la somerajn monatojn forŝetante la lastajn restaĵojn de la pene akirita scio.

Kaj eble estis ĝuste pro tio, ke la studentoj ĉe la esperanto-kurso estis tiom malmulte lernintaj, ke en ĉi tiu kazo la precedento ne validis. Regis almenaŭ ĉe la kursofina forta sento inter la anaro, ke la studadon oni devus daŭrigi k jam nun oni devus elpensi rimedojn utiligi la eĉ malmultan scion pri esperanto en la servo de la laboristklasa movado. Oni kunvokis kunvenon, rezulte el kiu estis starigata filio de Britia Ligo de Esperantistaj Socialistoj kun la plej organizkapablaj k-doĵ en la gvid-



postoj. La filio kunvenis ĉiusemajne dum du horoj k la elstara faro dum unu periodo de nia juna vivo estis kontraŭi la proponon ŝanĝi la nomon de la nacia organizo de B.L.E.S. al BLEA. Ni ja volis reteni en la nomo la vorton „Socialisto”, vidante en la ŝanĝo provon malkonfesi la politikan karakteron de la organizo. Kvankam ni malsukcesis en tiu nia unua bataleto, la afero helpis kunluti la anojn pli firme k iom poste kvin aŭ ses el ili aniĝis al S.A.T. Ĉar en la infanaj tagoj de organizo la rolo de la individuo pli malpli reliefe videblas, estus interese ĉi tie doni la nomojn de la gvidaj k-doĵ; jen ili, B. Turner, A. Sutherland, T. S. Boog, W. k A. McDonald.

Niaj rilatoj kun la nacia organizo neniam estis amikecaj k post tre mallonga tempo estis decidate aliigi nian titolon je Edinburga Laborista Esperantista Grupo. Nenia per-esperanta laboro estis farata, ĉar la tempo de la aktivuloj estis plene forkonsumata en ĉerbostreĉaj provoj legi „Sennaciulon”. Ankoraŭ strebante \*) al faroj, k kun plena konvinko pri tio, ke respondeco postulas agadon, ili persvadis la grupon lui tutatempe propran kunvencion. Ni optimisme luis ĉambregon kontraŭ luprezo kies pago postulis kotizon de ĉiu ano proksimume egalan al plensemajna salairo. La malforteco de la grupo tuj evidentiĝis k „politikaj malkonsentoj” duonigis la membraron. Sed la aktivuloj ne cedis, kelkaj kursoj estis starigataj k per „lertaj” financaj operacioj ni metis la grupon sur memsubtenan bazon. Diversajn varojn ni aĉetis k vendis je altigitaj prezoj; ekzemple razklingoj estis tiam la ĉefa fonto de enspezo.

Je tiu tempo ekzistis laŭnombre forta grupo de laboristaj esperantistoj en Glasgovo k ni faris provoin kunluti la fortojn de la du grupoj. Bonhance eble, tiuj klopodoj ĉesis antaŭ al la edinburga grupo infektiĝis de la malsano kiu finfine reduktis la 70-membran glaseovan grupon ĝis plenumo da interdisputantaj „preskaŭ-movantistoj”.

Dume, nia scio pri la lingvo kreskinta k ni alprenis kiel nian devizon „Esperanto en la servo de l'tutmonda proletaro”, sed ĝuste kiel efektiviĝi la devizon ni tute ne sciis. La batalo de la opozicio en SAT enkondukis vialacon ĝuste kiam la grupo laŭline mortmalsanas pro letargio. Kaj ĉi batalo efektive markis la turnpunkton en la historio de la grupo, ĉirkaŭante nin vole nevole albaŝi sur la internacian kampon, malfermante niaj okuloj novajn vastajn perspektivojn k montrante al ni eblojn finfine praktike utiligi la lingvon en servo de nia klaso.

Tre malcerta estis la financa pozicio de la grupo, niaj intimaj rilatoj kun maldekstraj organizoj neniel plaĉis al la luanto de la kunvenoj, kelkaj anoj fuĝis el la batalo, tamen la rezulto estis plena venko por la opozicio k reaniĝo al BLEA. Ĉi tie la nomo de Sutherland malaperas el la listo de fideluloj k kvankam la grupo estis fortigita per la plej bonaj elementoj trapasintaj la kursojn, neniuj novaj gvidantoj jam aperis sur la scenejo.

Tre baldaŭ tamen, novaj terminoj k nomoj komencis aperi sur la paĝo de la protokolibro, el kiuj elstaras „PEK” k k-do Kane. La kunapero de tiuj nomoj ne estis ia hazarda koincido, ĉar la unua reprezentis la konkretigon de ĉiuj niaj sopiroj k la dua reprezentis la novan kontingenton de viglaj aktivaj junuloj kiuj realigus nian devizon en la fajro de viva praktiko. Kaj jam nun ni povas konstati, ke la realo ne trompas niajn atendojn. Se estas vere, ke la hieraŭaj aktivuloj estas la hodiaŭaj ŝturmuloj, ankaŭ estas vere, ke oni povas superaksi la gravan rolon kiun ludas nia „nova generacio” el kies gvidstelo radias la signoj „IPE k PEK”.

Brila juvelo sur la blazono de la filio estas la infana sekcio kiu sub gvido de k-do Malcolm jam atingis tiun gradon de sperto en la lingvo, ke la anoj superatingas siajn pliaĝajn K-doĵn ne nur en lingvoscio sed ankaŭ sur la kampo de internacia kores-



En la mezo: „Ruĝa Esp-isto” organo de BLEA. Maldekstre: „Contact” la anglalingva PEK-organon k dekstre la „Britia PEK-Bulteno” esperantlingva. Ĉiuj organoj aperas monate.

pondado.

Ni ne povas fini ĉi tiun tre kalvan skizeton sen menci, ke la relative glata k facila transiro de teoriumado al praktika laboro estis multe akcelata per tio, ke la filio ne estas ido de la burĝa esperanta movado, sed ek de komencaj tagoj konsistas el klaskonsciaj gek-doĵ kiuj, lernante esperanton, vidas en ĝi nur ilon en la liberiga batalo de la laborista klaso.

TURBO.

## IPE-Konferenco k la laboro de la Lingvo-Komitatoj

*Tiu ĉi artikolo estas verkita laŭ komisio de la IPE-konferenco.*

Se ni volas ĝuste difini la specialan rolon de IPE en la lingva kampo, ni devas bone kompreni la taskaron de la proleta esperantistaro en la nuna periodo. Ĝis lastaj jaroj, la lingvo-institutoj kreitaj de la „neŭtrala” movado, kvankam plene konservativemaj kaj reakciaj, povis pli-malpli sufiĉi la bezonojn de la lingvouzantoj. Sed la nova ilo, PEK, elforĝita de la revoluciema esperantistaro, postulis novan teknikon, novajn kapablojn kaj malfermis novajn perspektivojn de lingvo-evoluado. La burĝaj institutoj farigis tute maltaŭgaj kaj IPE trovis necesa fondi la proprajn lingvo-komisionojn kaj starigi apartajn celojn por la disvolvo de la lingvo.

Tamen, la Lille-a konferenco devis konstati, ke IPE ĝis nun tute malsukcesis atingi kontentigajn rezultojn en lingva laboro. La diversaj sekcioj ne donas al lingvo-aferoj la necesan

seriozan atenton, dum la centra instanco, ISLK, sin montris tute malkapabla organizi kaj gvidi la laborojn.

Ni ne povas ne konjekti, ke tiu ĉi malaktivo sur lingvo-fronto estas nur respiegulo de la konfuzo kiu ekzistas multloke pri la relativa graveco de PEK-laboro. La tuta lingvo-laboro de IPE devas baziĝi sur la bezonoj de PEK. Do, se ni volas kompreni la taskojn de la lingva fako, estas nepre necese, ke ni ĝisfunde konu la principojn de PEK-laboro.

Estas nia celo kunligi kaj unuigi la diverslandajn proletarojn, unuvice per la kolektiva korespondado, kaj duavice per la gazetservado. Evidente, se ni volas atingi konsiderindajn amasojn, ni ne povas limigi nin al esperantistaj vicoj, sed devas varbi al ideo pri kolektiva korespondado la plej vastan neesperantistan publikon, precipe en la sindikatoj kaj fabrikoj. Se ni volas trafi la paĝojn de la laborista gazetaro, aŭ sukcese eldoni la proprajn nacilingvajn PEK-bultenojn,

\*) ĉi tiu: aspiri, celi.



ni devas scii prezenti niajn materiaĵojn en konciza, korekta lingvaĵo — ni devas scii verki, ne belajn poeziaĵojn por ornamati la paĝojn de „Sur Posteno”, sed artikolojn por niaj PEK-bultenoj kaj pri la gravaj problemoj de nia movado.

Jen do estas la fundamento sur kiu estu konstruataj niaj lingvo-institutoj. Kaj tiu fundamento nepre difinas la formon de la strukturo. La bezonoj de kolektiva korespondado inter grandaj laboristamasoj postulas grandan korpuson da plenkompetentaj tradukantoj. Ĉar la plej grava korespondado estas tiu inter metisindikatoj kaj metiistaj grupoj en la fabrikoj, estas necese, ke la tradukantoj estu kompetentaj ankaŭ pri la fakterminaroj.

Ĉu hodiaŭ ni kapablas grandskale entrepreni la organizadon de kolektiva korespondado? Certe ne! La lingvonivelo de IPE-membraro estas hontinde malalta; tiom, ke nur etan frakcion de la tuta anaro ni povas taksati tradukkapablaj. En Britio, ekzemple, estas nur manpleno da spertaj kamaradoj. Sub nunaj kondiĉoj ni ne povas multe pli disvolvi kolektivajn korespondadon, ĉar ni ne havas sufiĉan tradukforton. El nia sperto ni povas konstati, ke multaj aliaj landoj baraktas en simila situacio. Suoŝajna travizardo de PEK-bultenoj kaj kolektivaj leteroj malkovras la plej krudajn kaj elementajn erarajn, kiaj ekzemple: „Mortanto de malriĉuloj”, „la batalo daŭrigas”, „la rezistaro devis akordi kelkajn favorojn”, „ne havante trinkita kafon” k.s.

Tia estas la kampo kiun la lingvokomitatoj devas plugi. Do, ties unu-grava tasko estas, ne la esplorado pri definitiva evoluo de internacia lingvo, ne la verkado de alt-teoriaj tezoj, ne la vartado de esperanta beleto, sed simple la prenarado de la anaro al la bazaj taskoj de la Internacio. La plej urĝa problemoj estas tiuj pri altigo de la ĝenerala nivelo de lingvoscio.

Tiu el la unuaj necesoj, kompreneble, estas taŭgaj elementa kaj progresinta kursoj, adaptitaj al la bezonoj de la koncerna lando. FEP jam faris bonegan laboron en tiu ĉi sfero; BLEA ankoraŭ nur elforĝas instrumentodon. Ĉar ni ne havas rilatojn pri lingvaj aferoj kun la diversaj sekcioj — nek kun ISLK — ni ne scias, ĉu tiaj kursoj ekzistas en aliaj landoj. Iuokaze, nura lingvoinstrua kurso ne sufiĉas. Povas okazi, ke eĉ sufiĉe lerta esperantisto estos nebona PEK-laboranto, nesciante traduki. Do estas utila instruado pri traduko. Tion entreprenas BLEA, presante en sekcia organo rubrikon „Ni Lernu Traduki”. Oni elektas citaĵon el kuranta PEK-laboro kaj donas ekzemplojn pri bona kaj malbona tradukmetodoj. Tamen, oni ankoraŭ nur

esploretas tiun vojon, kaj ne povas respondi pri finaj rezultoj. La centraj instancoj mem povas helpi al lingvo-perfektigo per la altigo de lingvo en ĉiuj eldonoj. Tre ofte la lingvaĵo de niaj gazetoj, bultenoj, EKRELO-aĵoj k.s. estas tute ne bona; ĉu do ni povas atendi, ke tiuj, kiuj ensuĉas tian nutradon fariĝu lingve perfektaj? IPE-konferenco substrekis la neceson por granda lingvo-rubriko en regule aperanta centra organo. Sendube tio plenigos grandan mankon, kaj ni devas insisti pri ĝi; sed ni zorgu, ke ĝi restos praktika helpilo en la aktuala laboro, kaj ne fariĝos ludilo en la manoj de teoriumantoj.

La lingvo-komitatoj havas gravan respondecon ankaŭ en la kontrolado de la lingvo. Lastatempe plifortiĝis la tendenco enkonduki neologismojn, kaj nun la tendenco minacas fariĝi vera malsano. Kompreneble, oni nek povas, nek volas, kontraŭi la enkondukon de necesaj formoj, kiam la inventinto bonvolas klarigi la signifon. Sed hodiaŭ multaj, kaj precipe la sovetianoj, elforĝas neologismojn amasprodukte, kaj facilanime utiligas ilin sen klarigo aŭ bezono. Jen estas kelkaj ekzemploj ĉerpitaj el la aktuala PEK-materialo: „Versio”, „prodagi”, „maneĝo”(?), „imaĝini”, „evento”, „enkuraĝi”, „intaktiĝo”, „infama” kaj multaj aliaj. Anstataŭ kontroli kaj moderigi tiun ĉi tendencon, kiu obligas la jam sufiĉe grandajn tradukmalfacilojn, kaj certe malhelpas al niaj orientaj kamaradoj, la centraj instancoj mem devancas ĉiun en la febra konkurado. En ĉiuj eldonoj de ISLK abundas neologismoj, sed malabundas klarigoj: en „Sur Posteno” estas pli da enigmoj ol troviĝas sur la dorsa paĝo. Multaj protestoj estas jam faritaj senrezulte; ni devas do certigi, ke la konferencdecido estas severe observata.

La fakto, ke ekzistas tia aferstato en la lingvo-kampo, per si mem pravas, ke ISLK plene fiaskis en sia laboro. La sperto de LK por BLEA ia donas pluajn pruvojn. Tiu stariĝis jam antaŭ 18 monatoj; spite tion, ke ni enketis ĉe ISLK, ni ankoraŭ ne certas, ĉu vivas aliaj LK-oi. Ni lernis nur, ke certe ne vivas ISLK. Al multaj korespondoj ni ricevis nur du mallongajn leterojn. Unu promesis la alsendon de „gravaj materialoj”... kiuj tamen ni ankoraŭ atendas. Spite la imponan programon kiu aperas en „Al la Nova Etapo”, ISLK ĝis nun faris nenion praktikan. Kiom ni scias, ĝi kunvenis dufoje, akceptis „gravajn rezoluciojn”... kaj nenion plenumis.

Ni jam vidis kia estas la situacio de IPE sur lingvofronto. Estas netolerebla, ke, kiam la movado bezonas fortan kaj viglan gvidadon en tiu sektoro, la sekretariaro kondukas tiom frivole. Tial la lingvo-rezolucio ak-

cente postulas la reorganizon kaj revivigon de ISLK. Evidente estas bezonataj novaj fortoj, kamaradoj kiuj havas praktikan sperton pri PEK-laboro, kaj kiuj scias disciplinite funkcii.

La unua tasko de la nova ISLK devas esti kunligi la jam ekzistantajn Lingvo — Komitatojn kaj starigi novajn en landoj kie ili ankoraŭ ne ekzistas. Ni ne povas kontroli internacian lingvon se nur unu-du nacioj partoprenas la laboron. Ĉiu IPE-sekcio devas havi kunlaboranto(j) al ISLK — precipe la orientaj sekcioj, kies lingvo-bezonojn ni nepre ne neglektu. ISLK devos intime kunlabori kun la landaj Lingvo-Komitatoj, utiligante sur internacia skalo ties laborojn. Ĝi devos regule prepari listojn de neologismoj kaj teknikaj terminoj; ĝi devos redakti grandan prilingvan rubrikon en „Sur Posteno”, aŭ eĉ se necese eldoni suplementon. Sed denove necesas parafi, ke la artikoloj ne estu tro alte teoriaj, kiel en „Nova Etapo”, sed praktikaj, aktualaj kaj instruaj.

Estas ankoraŭ alia aspekto de lingvokontrolado kiun ISLK eĉ ne ektuŝis... la kontrolado de EKRELO-aĵoj. Jam ofte okazis, ke libroj estas lingve kontrolitaj de samnaciono de la verkinto. Tio estas danĝera praktiko, kiu povas permesi enrampi „naciismojn” kaj lokajn neologismojn, kaj ne kondukas al tiu plena internacieco kiu devas esti nia celo. La konferenco decidis, ke la lingvo-kontrolanto ĉiam estu el alia nacio ol la verkinto. Estas al ISLK la tasko prizorgi la plenumon de tiu decido.

Rilata demando estas tiu pri kontrolilo por nia laboro. Kelkaj montras kontraŭstaron al Plena Vortaro, dirante, ke ĝi havas multajn mankojn. Tion ni povas konsenti, sed ni konstata ankaŭ, ke ĝis nun ĝi estas la sola taŭga kaj uzinda verko por nia celo. Preterdube ia vojmontrilo estas necesa por tiuj, kiuj emas erarvagi en la allogajn vojetojn de la vortarfado, kaj la konferenco sagace agis, decidante, ke Plena Vortaro estu provizore la akceptata vortaro de IPE, kaj ke terminoj netroveblaj en ĝi estu glosataj en ĉiuj niaj eldonoj.

La konferenco emfazis la ĉefecon de PEK-laboro, kaj deklaris, ke tiu estas la bazo de nia lingva laboro. Se la Lingvo-Komitatoj — kaj sekve ISLK — volas sukcese plenumi la proponitajn taskojn, ili devas intime kunlabori kun la PEK-centroj kaj filioj, palpante la pulson de la kuranta PEK-laboro, kaj laŭeble partoprenante mem la laboron. Nur tiel ili povas senti la diversajn kurentojn en la lingvo, ekscii la aktualajn bezonojn kaj plani sian agadon laŭ ĝusta linio. Lille-a konferenco faris valoregan servon, forbalaante multajn miskompren-



... kaj preparante la bazon por granda antaŭeniĝo de PEK. La Lingvo-komitato zorgu, ke sur ilin ne falos la kulpo malhelpi al tiu antaŭeniĝo per malplenumo de sia rolo. Ne estas tempo por plua prokrasto. La L.K.-oj de ĉiuj landoj devas ekvekiĝi kaj aktivigi. Ili fariĝu novspeca PEK-servo, kiu glatigos la vojon al la

lingvo-praktikantoj kaj evoluigos la lingvon per la plejble bona metodo — per la vasta komuna uzado. Ni fortiru la okulojn de Parnaso kaj turnu nian atenton al la vojo sub niaj piedoj.

Jack Kane,

Sek-io, LK por BLEA.

## Rezolucio pri la PEK-laboro

### Unuaj problemoj de PEK

Permezanta faŝismo, streĉaj preparoj de la kapitalismaj ŝtatoj por nova imperialisma milito direktita antaŭ ĉio kontraŭ USSR, kiu estas patrio de la tutmonda proletaro, vera, perŝpa batalanto k venke atingas la socialisman, postulas unuecan, revolucian fronton de ĉiuj landoj proletoj k laboruloj kontraŭ faŝismo k imperialismo.

Mutan gravon akiras nun internaciaj ligoj de la diverslanda proletaro, de ties amasoj. Plej gravaj estas la internaciaj ligoj inter la laboristoj k grandaj laborejoj („La fabrikoj estu niaj fortkajoj”, Lenin). Tiaj ligoj estas la plej bona tasko de PEK. Proleta esp-korespondado estas gravega k potenca ilo, se ĝi estas celtrafe organizata k organizata.

Lanti k la SAT-gvidantaro inspiris al laboristoj esp-istoj, ke ili devas okupi sin pri politika ne pri politikaj (t.e. ne pri klasbatalaj) taskoj. Lanti volas kredigi al la laboristoj, ke ili ne estas proletoj. Li celas helpante al la faŝismon, malbataligi laboristajn organizojn, sensignifiigi esp-on kiel ilon de la proletara klasbatalo. Pro tio en SAT amasa korespondado estas ignorata k konvulsiita kiel duagrada tasko.

Ĉi IPE-ano konsideras sin unuavice klasbatalanta proleto k partoprenas nedesireble en la unuecfrontaj vicoj de la proletaro kontraŭ faŝismo k imperialismo. Li konsideras esp-on nepra ilo por tiu batalo de la internacia proletaro. Ĉiu IPE-ano konsideras kiel unuavice specifan taskon en la proleta klasbatalo, kiu estas: *organizi la korespondadon inter diverslandaj laboristaj k laborulaj kolektivoj, precipe de la fabrikoj k grandaj laborejoj k perŝpa servoj, proletan servon en revoluciaj landoj. PEK estas baza ŝtono de IPE.*

IPE-filio, IPE-grupo aŭ aparta IPE-ano, devas kompreni tion, ankoraŭ ne estas veraj laboristaj kolektivoj. Unuavice k nepra tasko de IPE-filio, UK, IPE-grupo k de aparta IPE-ano estas organizado de internacia korespondado inter diverslandaj laboristaj kolektivoj, perŝperanta la bazon de la klasbatalaj, proletaj organizoj. Nur tiu bazo valoras propagando por esp-o. Ĉi IPE-konferenco en Lille serioze malaprobis la mankajn rezultojn de tiuj organizoj, kiuj ne iniciatas internacian korespondon, ne organizas internacian korespondon, sed okupas sin nur pri nuda propagando de esp-o. Despli malaprobindaj rezultoj de kelkaj IPE-organizoj neniiĝis k organizado de la laboristamasoj por internacia korespondado, neniiĝis amasan perŝp-an servon kiel korespondigi laboristkolektivojn, kiel PEK-bulenojn k.s.).

Nu ĉi tiu larango nun estas: „Ni iru precipe al laboristaj k grandaj laborejoj k ankaŭ al laboristaj kolektivoj k ceteraj organizoj por organizi internacian laboristkolektivajn korespondon inter diverslandaj kolektivoj”.

La laboristamasoj konsideras danĝera devio la mankado de la PEK-laboro for de la laboristaj kolektivaj kampoj de kolektiva korespondado kiel la korespondado nur de iuj esp-istaj PEK-bulenoj k grupoj. Simila nura internacia korespondado signifas apartigon de la proleta esp-ista movado for de la internaciaj vicoj de la klasbatalo, en kiuj ne-

### akceptita de la IPE-konferenco

desireble marŝas IPE. Tio signifas sektanigon de similaj PEK-filioj k IPE-grupoj. Kontraŭ tia sektanigo ni devas konsekvence batali.

#### Funkcioj k labormetodoj de PEK

La sperto de IPE-sekcioj (BLEA, BuLEA, JPEU, SEU k.a.) montris, ke en la nunaj cirkonstancoj la plej efika, perŝpa laboro estas nur la amasa laboro. La IPE-konferenco tiel konstatas, ke la Proleta Esp-Korespondado ĉiam devas celi laboristamasojn, organizi ilin por internacia, proleta eduko, por batalo kontraŭ faŝismo k imperialismo. Proleta Esp-Korespondado estas poramasa k poramasa, perŝpa servo, kiu celas proletan, internacian edukon.

Por tion atingi PEK-organizoj kiel ĉefajn funkciojn, laŭ ordo de gravo havas:

a. organizadon de internacia, kolektiva korespondado ĉe neesp-istaj amasoj en fabrikoj k sindikatoj, precipe inter kapitalistaj landoj k Sovetio, klopodante ricevi helpon tiurilatan de revoluciaj organizoj kiaj estas ruĝsindikatoj, Asocio de amikoj de Sovetio k.s.

b. organizadon de internacia, kolektiva korespondado inter kamparanaj, junularaj, diversasociaj (IRH, sportuloj, ateistoj ktp) laboristaj kolektivoj, precipe inter kapitalistaj landoj k Sovetio.

c. eldonadon (aŭ presforme aŭ multobligite) de PEK-bulenoj en esp-o, kompilitaj el leteroj k artikoloj verkitaj aŭ tradukitaj de enlandaj laboristaj korespondantoj, kies enhavo estu unika k ne konkurenca al jam ekzistantaj pli rapide funkciantaj revoluciaj presservoj nacilingvaj.

ĉ. eldonadon (aŭ presforme, aŭ multobligite) de PEK-bulenoj en naciaj lingvoj, kompilitaj el leteroj de eksterlandaj korespondantoj k PEK-materialoj k akuratan servon de PEK-materialo al laborista gazetaro.

d. konsultadon al laboristaj organizoj pri organizado de internacia korespondado k pri utiligo de ties materialoj por internacia eduko (amasa legado de ricevataj leteroj k diskutoj pri ili, ekspozicioj, interŝanĝo de teknika sperto de standardoj ktp.) k helpon tiurilatan

e. perŝadon inter diverslandaj proletaj kulturaj organizoj, k institucioj, kiuj celas havigi al si necesajn organizkontaktojn, interŝanĝon de sperto aŭ de diversaj objektoj k materialoj.

Konsiderante gravajn atingojn de multaj P.E.K.-Centroj k filioj la konferenco tamen atentigas pri diversaj mankoj en la labormetodoj, kiujn oni nun devas korekti:

a. pasiveco ĉe la organizado de kolektiva korespondado. Ankoraŭ multaj P.E.K.-filioj efektivas tiun ĉefan taskon spontane, plenumante nur „mendojn” el eksterlando, transdonante ilin al la koncernaj laboristkolektivoj k ĉe poste ne kontrolante k ne instigante regulan korespondadon. Nepra tasko de ĉiu filio devas esti laŭplana organizado de kolektiva korespondado sur la bazo de elekto de plej gravaj laboristkolektivoj, kiujn necesas priservi unuavice. P.E.K.-filioj ĉe koncernaj kolektivoj mem devas iniciati tiun aferon k poste regule k aktive gvidi ĝin.

b. ofta nekonkreteco k neaktualeco de la P.E.K.-laboro, ĝia desiriteco for de la fluant-

aj taskoj de la klasbatalo en la koncerna lando. En leteroj k P.E.K.-bulenoj abundas ĝeneralaj, tutlandskalaj informoj, ofte konataj en eksterlando k jam malnoviĝintaj. Ĉefa metodoprincipo por eviti tiun mankon estas nepra, intima ligo de ĉiu P.E.K.-entrepreno kun fluantaj taskoj k faktoj de proleta klasbatalo en sia lando, distrikto, urbo, nepra respeguligo de lokaj faktoj. Oni devas utiligi strikon de laboristoj por aranĝi kolektivajn korespondon kun samprofesiaj kolektivoj en eksterlando. Oni devas kapti por tio okazon de amasa, kontraŭfaŝista elpaŝo por korespondigi plej gravajn laboristkolektivojn k.s. Imi-tindaj ekzemploj de tia ligiteco kun aktualaj momentoj de la klasbatalo estis montrataj de P.E.K. en Britio (laborista malsatmarŝo al London) en Bulgario (kolektado de materialoj el Sovetio, senmaskigantaj kontraŭ-sovetan ekspozicion, aranĝitan de rusaj blankuloj), siatempe en Germanio (organizado de laboristaj grupoj por teknika konsulto al la mekanigo de la Donbas en Sovetio, kiam al tio alvokis k-doĵ el Stalino k korespondigo de tiuj grupoj) k.t.p.

c. apogo en la P.E.K.-laboro nur sur propraj fortoj. Tiu manko ankaŭ sekvigas izolitecon k neaktualecon de la laboro. P.E.K.-oj devas starigi bonajn rilatojn kun revoluciaj organizoj, kiaj ekz. ruĝsindikatoj, Asocio de amikoj de Sovetio k.s. por ricevi de iliaj membroj helpon en organizado de kolektiva korespondado ĉe la fabrikoj k grandaj laborejoj. P.E.K.-oj devas kunlabori aktive kun ĝenerala, laboristkorespondanta movado, aliri laboristkorespondantojn por verkado de artikoloj por esp-aj PEK-bulenoj, mendi artikolojn ĉe funkciuloj de diversaj laborist-organizoj, kies materialo povas esti aktuala, iniciati ĉe diversaj proletorganizoj eldonon de por-eksterlandaj esp-bulenoj, informleteroj k.s. per propraj rimedoj. P.E.K.-oj devas helpi al redakcioj de klasbatalaj, proletaj gazetoj krei laboristkorespondantaron k aktive kunlabori en ĝi, formante laboristkorespondantajn sekciojn de internaciaj korespondantoj, instruante al ili esp-on. Tiurilate bonan vojon montris bulgara P.E.K.-Centro.

ĉ. hazardeco de materialo en P.E.K.-bulenoj, kiu rezultas el tio, ke ne estas planataj la temoj de kunmetataj n-oj de bulenoj. Estas necese, ke redakcioj de PEK-bulenoj nepre zorgu pri vicaj, aktualaj temoj k laŭeble komisiu verki aŭ traduki koncernan materialon. Por sukceso de nia propagando gravas, ke en P.E.K.-bulenoj estu nepre materialo kiu koncernas la agadon de tiuj organizoj, kiuj estas priservataj de P.E.K. (en B.L.E.A.-P.E.K.-buleno la ateista angulo k.s.) Treege utila en tiaj bulenoj estas organizkorespondanta fakto, kiel tion faras P.E.K.-Centro de B.L.E.A.

Nacilingvaj P.E.K.-bulenoj estas rekomendindaj laŭ la tipo de „Mejdunaroden Rabselkor” presata de BuLEA, se ili estas ilustritaj k kompilitaj precipe el senperaj leteroj de eksterlandaj laboristoj k kamparanoj k disvastigataj helpe de aliaj laboristaj organizoj. Eldono de similaj P.E.K.-bulenoj en kadro de sekcia I.P.E.-gazeto kiel faras F.E.P. estas rekomendinda, se koncernaj paĝoj samtempe estas presataj aldone k aparte disvastigataj. Alie ili ne atingas tiom vastajn amasojn.

En blankteroraj landoj necesas rekomendi al la lokaj P.E.K.-filioj eldoni esp-ajn P.E.K.-bulenojn, krom la centraj, kiel tion faras multaj organizoj de J.P.E.U., Bu.L.E.A., B.L.E.A. k F.E.P. Tio multe vigligas la P.E.K.-laboron k pli aktualigas la materialon en eksterlando.

d. nerespondo al kolektivaj korespondoj aŭ malrapida respondo, kiu miskreditigas la esp-

Adreso de IPE-Oficejo, EKRELO,

Sur Posteno:

Postbox Z 5, Amsterdam-Z. Nederland.



an movadon k senvalorigas multe da pena laboro. Multaj gravaj korespondoj jam fiaskis pro malserioza rilato, precipe ĉe sovetiaj k-doj. Estas necese, rapidigi P.E.K.-servojn. Precipe grava estas *tiu* respondo al kolektivaj korespondoj. Eĉ du-tritaga prokrasto povas detrui eblojn en kazoj, kiam strikoj donis al P.E.K.-filio la okazon starigi korespondadon. En ĉiuj kazoj tia senrespondeca neglekto devas esti publike k severe kritikata en la organo de la centro. Por ebligi la sukcesan eldonon de enlandaj P.E.K.-bultenoj estas nepre necese *regule k akurate* aperigi P.E.K.-bultenojn en esp-o. Nuntempe tiu ĉi preserva laboro estas grave malhelpata (kiel jam spertis britia P.E.K.) pro la malakurata eldono de preserva materialo.

c. malalta lingvonivelo k tradukkapablo. Tiu ĉi malforto estas granda barilo al la disvastigo de la kolektiva korespondo. Multaj sekcioj pro manko de tradukkapablaj k-doj jam nun apenaŭ povas prilabori nunan kvanton da laboro k memevidente ne povas plu disvolvi siajn P.E.K.-servojn. Estas do unu-grava tasko de ĉiu sekcio serioze alpaŝi la problemon pri altigo de la lingvonivelo en sia lando, pere de normigita lernokurso, pri-traduka instruo en naciaj organoj k starigo de lingvo-komitato por kontrolo pri neologismoj k ĝenerala lingvouzo.

#### Organizaj taskoj de PEK

a. Gis nun multaj organizoj ne klare komprenas la organizan strukturon de PEK. En Hispanio oni provas krei esp-istajn grupojn por kolektiva korespondado, nomante ilin P.E.K.-grupoj. En aliaj landoj oni provas fondi iujn perantejojn en la kadro de I.P.E.-grupoj aŭ komitatoj, same ne ligitaj inter si. La skemo de P.E.K.-organizo en ĉiuj landoj, kie troviĝas I.P.E.-sekcio aŭ U.K. estas jena: ĉe la L.E.A.-estraro aŭ U.K. ekzistu P.E.K.-Centro gvidata de komisiita k-do. Ĝi eldonu landan P.E.K.-bultenon esp-an por la eksterlando k nacilingvan por enlando. Ĝi direktivu la laboron en la tuta lando. La P.E.K.-Centro konsistu el kolektivo de k-doj komisitaj de la sideja L.E.A.-grupo. La koncernaj k-doj laŭeble estu liberigitaj de aliaj organizaj taskoj k mem konu la praktikon de filia P.E.K.-laboro. Ĉiu loka grupo ne fondas en si apartan P.E.K.-filion, sed konsideras la P.E.K.-laboron kiel la bazan taskon de la tuta grupo. Ĝi elektas P.E.K.-organizanton k laŭnece komitaton, kies devo estas altiri por tradukado k aliaj PEK-laboroj ĉiujn membrojn k ankaŭ lernantojn k simpatiantajn laboristojn, inkluzive esp-istojn, kiuj ne estas anoj de I.P.E. Kun ili la loka grupo organizu laŭplane kolektivajn korespondadon en fabrikoj k proletaj organizoj. Ni memoru, ke unueca, esp-ista fronto unuavice devas esti forĝata per la P.E.K.-laboro. Ni devas taksi niajn organizojn unuavice laŭ tio, ĉu ili jes aŭ ne kapablis krei sukcese funkciajn P.E.K.-ojn.

b. Farigis akra problemoj pri P.E.K.-kontingentoj. Ni ne sukcesas krei k eduki P.E.K.-aktivulojn, se ni samtempe malbone progresas en la preparo de lingvospertaj P.E.K.-anoj. La kvalito laŭ enhavo k lingvaĵo de perataj leteroj k de artikoloj en P.E.K.-bultenoj estas multokaze malalta. La kontingentan problemon ni devas aparte atenti. Estas rekomendinda la arango de diversaj konkursoj inter P.E.K.-anoj pri plej bona traduko, pri plej bona verkado de letero aŭ artikolo, kolektiva verkado de leteroj al la eksterlando laŭ tipo de „tekunsidoj“ de ĉiniaj k-doj, organizado de socialisma konkurado inter individuaj P.E.K.-anoj k P.E.K.-filioj, aperigo de regulaj traduk-konsiloj k ekzemploj en gazetoj, sur la bazo de kontrolado de la filia P.E.K.-laboro, kiel tion faras „Ruĝa Esperantisto“ de B.L.E.A. La problemoj pri lingvospertaj P.E.K.-anoj trovas sian solvon ankaŭ en tio, kiom sukcese ni partoprenigas en la PEK-laboro laboristajn esp-istojn el la kadro de S.A.T., de aliaj, ne I.P.E.-tendencaj organizoj. De tiu vidpunkto

ni devas plivastigi nian varbadon inter diversaj laboristaj amasoj por PEK. Socialisma konkurado k premio de la plej bonaj PEK-anoj devas fariĝi unu el la fundamentaj principoj por plialtigo de kontingenta kvalito k kreo de novaj kontingentoj.

c. Planado de la laboro trece gravas. Planado kun zorga kontrolado donas konkretajn taskojn, obligas ĝustan disponon de la fortoj k koordinan laboron k evoluigon de la diversaj fakoj, malkovras mankojn k tiel ebligas ilin forigi per konkretaj paŝoj. Ankaŭ tiurilate estas imitinda la sperto de britia PEK, kie ĉiu loka PEK-filio ellaboras sian laborplanon interkonsente kun la gvidanta PEK-organon k kie PEK-Centro sur la bazo de tiuj planoj kunmetas ĝeneralan laborplanon de PEK, organizante konkuradon inter PEK-filioj, ĉiam publikigante la pasadon de tiu ĉi konkurado. La laborplano devas koncerni jenajn taskojn: nombron k laŭeble nomojn de priservataj k kolektive korespondigataj organizoj, nombron de leteroj k artikoloj transdonitaj al la gazetaro, taskojn partopreni en politikaj k ekonomiaj laboristamasaj elpaŝoj, kontroliferojn de artikoloj liverotaj por PEK-bulteno, de aranĝotaj letervesperoj, ekspozicioj pri korespondaj, nombron de plimultigo de PEK-anoj k tiurilatajn entreprenojn, kontroladon k plialtigon de la tradukkapablo per ekzamenoj, taskojn pri aperigo k disvastigo de nacilingvaj PEK-bultenoj, pri organizado de teknika helpo al Sovetio ktp.

ĉ. Eldono de PEK-bultenoj ĉu por eksterlando, ĉu por enlando devas esti nepre devo de ĉiu PEK-Centro ĉe UK k centraj organoj de LEA-oj. La sama eldono ĉe lokaj PEK-filioj estas dezirinda, se tion permesas la fortoj k ne malhelpas la funkcion de centraj bultenoj. PEK-bulteno de internacia IPE-Centro estas superflua, malbezona. La landoj, en kiuj ne ekzistas PEK-bultenoj korespondu senpere al la gazeto de IPE, el kiu la LEA-oj povas ĉerpi instrukciajn k metodan materialon. Internacia PEK-Centro devas fari publikigojn aŭ en Kunligilo, aŭ en speciala PEK-paĝo en la IPE-gazeto.

Devas esti starigita internacia minimumo de PEK-laboro, kiun ni nepre devas postuli de ĉiu landa PEK-Centro. Tiu minimumo estu 1. laŭplana organizado de kolektivaj korespondoj ĉe fabrikoj, sindikatoj k laboristaj organizoj, 2. eldono de esp-a bulteno. La landaj PEK-Centroj, konsiderante la lokajn kondiĉojn devas ellabori pli konkretajn minimumojn por siaj PEK-filioj. La tasko por la proksima jaro estas, ke tiu ĉi minimumo estu plenumita de ĉiuj UK-oj k IPE-Centroj.

d. Trece aktualigis la problemoj pri gvido

al PEK-laboro. Por tio gravas jam organiza skemo de PEK-retaro. La konferenco opinias, ke la strukturo de PEK en BLEA estas tute akcepteblaj por ĉiuj normalaj laborkondiĉoj de IPE-sekcioj. Ĉiu loka grupo havu PEK-organizon aŭ komitaton (tio dependas de la multmembreco), ĉe distrikta LEA-komitatoj estu nepre kreataj distrikta PEK-organizantoj k ĉe UK aŭ LEA-Centroj la landaj PEK-Centroj. La distrikta filio precipe havas la taskon ne direktivi, sed konsulti la lokajn PEK-organizantojn pro apartaj aranĝoj de laboro, diskonigi PEK-sperton al ili, instruante ilin pri praktikaj laboraranĝoj. Gravus, ke la distrikta filioj pli ofte vizitu la lokajn filiojn k kunvenigu PEK-organizantojn por pri-diskuti praktikajn aranĝojn. Landaj PEK-Centroj devas ellabori principojn, bazante sin sur la direktivoj de la IPE-kongresoj k internacia PEK-Centro, metodojn k taskojn de laboro, adaptita al la landaj kondiĉoj, instrukciajn distriktajn filiojn aŭ perletere, aŭ precipe per PEK-paĝo en LEA-gazeto, analizante bonajn k malbonajn spertojn de lokaj k distrikta filioj, kontrolante la plenumon de laborplano, organizante tutlandskalajn PEK-kampanjojn okaze de iuj politikaj k ekonomiaj okazintaĵoj ktp.

PEK-paĝo instrukcia k konsulta, interŝanĝanta sperton de la lokoj devas esti en ĉiu LEA-organon. Dum ĉiulanda aŭ distrikta konferenco kiel fundamenta demando en la tagordo devas esti la demando pri PEK-laboro.

Internacia PEK-Centro devas esti precipe organo por metoda laboro, sumigante k studante la sperton de landaj PEK-oj por organizado de internaciaj PEK-kampanjoj, por kontrolo pri la laboro de la enlandaj PEK-Centroj k konkreta konsulto al ili, por organizado de la PEK-laboro en tiuj landoj, en kiuj ne ekzistas PEK-organoj k por starigo k reguligo de internaciaj PEK-ligoj.

e. Dum lastaj jaroj kelkaj IPE-sekcioj pro enlandaj politikaj cirkonstancoj estis devigataj transiri al nelegaj formoj de la laboro. Ili trece bezonas internacian ligon, PEK-informadon. Senpera sendado de leteroj al apartaj k-doj en tiuj landoj farigas por ili endanĝeriga. Aliflanke PEK-informado de tiuj ĉi organizoj por aliaj havas gravan signifon, kolektiva korespondado ankaŭ. Pro tio la IPE-konferenco konsideras nepre necese organizi kun tiuj sekcioj ligojn laŭ speciala regularo, laŭbezzone centralizite, sed nepre disvastigi tiujn ligojn, aprobante la decidojn de la nelega GLEA-konferenco pri PEK-laboro.

## Korespondadu!

Tarifo por korespondado: trilingva anonco kostas 2 respondkuponojn. Ĉiu plia linio kostas 1 respondkuponon.

#### BELGIO.

K-do e.v.d. Bulek, Harnasstr. 29, Mecheln, dez. koresp. kĉl-virinaro ĉiu-aĝa pri am-infan-religi- k seksproblemoj, laborist- k popolmovadoj.

#### FRANCIO.

Mi dez. koresp. kun gek-doj el Sovetio pri politikaj temoj. Adreso: Jean Daumal, Villa les Vuis, Avenue de la Concorde, Arnouville les Gonesse (S. et O.).

Mi dez. aranĝi ekspozicion. Sendu fotojn, PK, PM, humorajn desegnojn, gazetojn ktp. Precipe mi volas elmontri la tutmondan laboristan vivon (festo, strikoj demonstracioj, hejmaj

vidindaĵoj) k la esp-movadon. Gek-doj k grupoj el Argentino, Brazilo, Ĉinio, Hindio, Japanio, Sovetio, Aŭstralio, Usono, helpu al ni. Mi ankaŭ intencas aranĝi varbilojn laŭforme de albumoj el la ricevitaj dokumentoj. Mi nepre resp. leterojn. Adreso: C. Gautier, Villa Michel, Avenue des Remparts, Marrakech-Gueliz (Maroc).

#### NEDERLANDO.

K-do J. Waalewijn, Hoofdweg 103 II Amsterdam, dez. koresp. pri ĉiuj temoj rilate al la venonta tempo. Samtempe interŝanĝo de ĵurnaloj, gazetoj (francaj, germanaj, esp-aj, hollandaj).

K-do D. Meier, Egelantiersstr. 166, Amsterdam dez. koresp. kĉl pri laborista movado k pri fabrikado de ledaj monujoj kun k-doj el ĉiuj landoj, speciale el Sovetio.